Theodor Storm,

# Rigora lumo eniĝas

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*Post la morto de lia unua edzino Konstanco ekkaptis la poeton teruro antaŭ „tiu eterna dezerta estonteco“, vi-dalvide de ammalplena, senfeliĉa ekzistado, pri kiu ne-niu kredo je rekuniĝo en la transo povas konsoli. Lapide kaj dure, ne uzante la de li alitempe preferata kantfor-mo, la poeto parolas pri tiu nova sperto:*

Sed, rigora lumo eniĝas;
Kaj antaŭ mi ĝi etendiĝas,
Dezerte, plena da teruro kaj soleco;
Tie, fore, mi antaŭsentas la abismon;
En ĝi la nenion. –

Sed pluen kaj pluen
Trenas mi min
De tago al tag',
De monat' al monat',
De jaro al jar';
Ĝis mi fine
Elcherpita je l' vivo kaj sen espero
Falos suben ĉevoje
Kaj la malnova, eterna nokto
kovros min kompate,
kune kun ĉiuj revoj kaj sopiroj.

. . .

Theodor Storm,

# Unerbittliches Licht dringt herein

*Nach dem Tod seiner ersten Ehefrau Constanze ergriff den Dichter der „Schauder vor dieser ewig öden Zu-kunft“ angesichts eines liebeleeren, glücklosen Daseins, dem kein Glauben an eine Wiedervereinigung im Jen-seits Trost geben konnte. Lapidar und har, ohne die sonst von ihm bevorzugte Liedform zu benutzen, spricht er von dieser neuer Erfahrung:*

Doch, unerbittliches Licht dringt ein;
Und vor mir dehnt es sich,
Öde, voll Entsetzen und Einsamkeit;
Dort in der Ferne ahn ich den Abgrund;
Darin das Nichts. –

Aber weiter und weiter
Schlepp ich mich fort;
Von Tag zu Tag,
Von Mond zu Mond,
Von Jahr zu Jahr;
Bis dass ich endlich,
Erschöpft an Leben und Hoffnung,
Werd hinstürzen am Weg
Und die alte ewige Nacht
Mich begräbt barmherzig,
Samt allen Träumen der Sehnsucht.“

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Unerbittliches Licht dringt herein" de* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2002-04-14.*

*MR-395-1b / Arg-198-393 (2004-03-05 23:04:27)*

*La germana-lingva originalo de tiu ĉi poemo estas presita en la libro „Theodor Storm" de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches In-stitut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6. El tiu libro estas prenita ankaŭ la supra klariga teksto.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04).*

*Arg-198-392 (2004-03-05 22:57:18)*

*Das Gedicht ist abgedruckt in dem Buch „Theodor Storm" von Re-gina Fasold, aus der Serie „Bild-Biographie" , herausgegeben vom Verlag VEB Bibliographisches Institut Leipzig, in 1990, ISBN 3-323-00196-6. Aus diesem Buch ist auch der obige erklärende Text entnommen.*